

& Senlaborulo:

< Rekante 35 el 53 batoj por strofo, entute 636 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis kaj komponis Claude Piron.>

(# Melodio:

<:53> (LaTi doTi domi mado Tido TiLa Ti Ti i; redo Tido TiLa TiLa FaFa LaFa Mi Mi i;

(#Rekantaĵe: (MiLa LaLa LaTidoTi LaLa; Tido reTi Tidoredo TiTi; ReMi FaRe ReMi FaRe FaFa LaFa Mi Mi i;)× h)

)×12)+

(& Strofoj:

'1 Kiom longaj estas tagoj al senlaborulo, ; kiu antaŭ tridek tagoj manĝis lastan kukon.

(×; **Trinku sukon, oni diris al mi, ; manĝu kukon, oni diris al mi, ; trinku sukon, manĝu kukon, vi fariĝos forta. ; Trinku sukon, oni diris al mi, ; manĝu kukon, oni diris al mi, ; trinku sukon, manĝu kukon, vi fariĝos bela.**)

'2 Venas uloj, iras uloj, longe min rigardas, ; montras mane, nekomprene; dono ne okazas.

'3 Jen riĉuloj sur la strato iras tre trankvile, ; mi la monon ĝojoportan serĉas malfacile.

'4 Sur la strato kun malĝojo kion eblas fari? ; Antaŭ pordo de kafejo ĉu nur sola stari?

'5 Ĉu sur strato mi plu staru aŭ ĉu mi eniru? ; Kiam estos ene mi, nu, kion mi eldiru?

'6 Ĉu sin montru la malĝojo ĉe mi sur vizaĝo? ; Ĉu bonulo venos porti kukon al la tablo?

'7 Al kelnero sen kolero mi paroli devos ; kompreneble, kaj ĉu eble kafon mi ricevos?

'8 Ĉu komprenos la kelnero ke mi estas senmona? ; Se li donos kafon al mi, mi fariĝos ĝoja.

'9 Aŭdu, aŭdu, geamikoj, voĉon de la frato, ; donu kukon, donu sukon, kune kun la kafo.

'10 Jes, gefratoj, vi komprenu, kion mi malriĉas ; donu iom da poŝmono, al mi nun sufiĉas.

'11 Donu trinkon, donu manĝon, donu multe, multe, ; kaj mi donos mian foton al vi dank-salute.

'12 Kaj per tio jen mi finas la malĝojan kanton, ; vi min aŭdis, vi komprenis, havu mian dankon.)